

Gazeto



Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

39-a Jarkolekto - Septembro 2025 - N-ro 138

Coria del Río
(Sevilo)



Julio / Septembro 2025

Enhavo

- P. 03 Esperanto en Andaluzio.**
P. 10 *Loquerisne latine? Kiamaniere eŭropaj klasikaj lingvoj daŭre floras*
P. 13 Lingva Angulo:
Peticiones por favor.
P. 16 Poezia Angulo.
P. 17 Nuntempa Vortaro:
Kermeso aŭ Foiro
P. 19 Folioj por Praktikado.
P. 23 Turismi en ... *Coria del Río (Sevilo)*
P. 27 Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio: *Emilio Castellano Vita, klera granadano.*
P. 29 Humuro.
P. 30 $E=mc^2$ Sciencia Angulo:
La volvlibroj de Herkulano.
P. 32 Flamenko: *Kio estas la sorĉo?*
P. 34 Fervojista angulo:
La fervojo de S-ro Henderson.
P. 36 Komikso: *Trans Suno.*
P. 42 *Ĵus aperis!*
P. 43 Nun Ni. Junulara Paĝo.
P. 44 *Ŝako: Peon-strukturoj.*
P. 46 Skolta Mondo.
P. 48 Andaluzia Kuirarto:
Mozarabaj terpomoj.
P. 50 Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio:
La operaco "Tracer".
P. 52 Vorto-ludoj.

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruiz, en San Fernando (Cádiz) en 1910. Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Ánfora 6 5-D
29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86.
ISSN: 1576-0618.

DIRECTOR: Ángel Arquillos López
REDACTORES:
José María Rodríguez Hernández
Alejandro Burgos Escalante
COLABORADORES:
Cristina Bollini
Carlos Spinola



*Sur la kovrilo:
Vidaĵo de Coria del Río (Sevilo)*

ESPERANTO EN ANDALUZIO

Estas nomita strato honore al esperantisto en Kordovo

La kordovaj municipaj aŭtoritatuloj decidis nomi straton per la nomo *"Librero Rogelio Luque"* (Libristo Rogelio Luque). La inaŭgurita strato troviĝas sur nova kvartalo de la urbo. La kordova magistrataro do, omaĝas homon, kiu en la jaro 1919, kaj nur 22-jaraĝa, iniciatis librovendejon en Kordovo, ankoraŭ ekzistanta kaj regata de lia neparo. Rogelio Luque estis delegito en la urbo de Universala Esperanto-Asocio, kaj en tiu librejo troviĝis la sidejo de la loka esperantistaro. Rogelio Luque estis mortpafita dum la komenco de la hispana civila milito en la jaro 1936, sub la akuzo vendi marksismajn kaj naturismajn librojn.



Strat-sildo kun la nomo *"Librero Rogelio Luque"* en la urbo Kordovo, honore al elstara esperantisto.

Maldekstren, Rogelio Luque kiel organizanto kaj partoprenanto en la 5-a Hispana Kongreso de Esperanto, Kordovo 1925.

Ĉin-Svisa esperantistino vizitis Andaluzion

La pasintan monaton januaron '26 vizitis Andaluzion la ĉin-svisa samideanino Liu Jun. Ŝi estas ĉina esperantisto kiu, de antaŭ kelkaj jaroj, loĝas en Svisio. Jun vojaĝis unue en Velez-Málaga (Malago), tie li estis akceptita de nia amiko Fabián kaj ŝi vizitis ankaŭ la vilaĝojn Nerhon kaj Frigilianon. Poste ŝi vojaĝis en Kordovon, kie nia samideano Ĉema akompanis ŝin okaze de du-taga vizito al la urbo. Kvankam la vojaĝo nur daŭris nur semajnon, verdire ŝi konis belegajn lokojn en Andaluzio.



Jun Liu dum sia vizito al Andaluzio, kun Fabián Jiménez en la groto de Nerho, kun kelkaj lernantoj de Esperanto en Vélez-Málaga kaj dum sia vizito al la Moskeo de Kordovo.



Jun poste montris la plej belajn momentojn de sia vojaĝo al ĉinaj esperantistoj dum informadika prezentado. La resumo de ĉi tiu vojaĝo, laŭ vortoj de Jun mem, estis: *"vojaĝante sola sed ne soleca"*.

Nova informilo en esperanto en Andaluzio

OFICIALA JURNALO DE LA ANDALUZIA JUNULARA ESPERANTO-UNUIĜO

LA SUNO
ANDALUZIA

DIARIO OFICIAL DE LA UNIÓN JUVENIL ESPERANTÓFONA DE ANDALUZIA

№ 1 • ANDALUZIO, HISPANIO JARO 2025

NOVA EPOKO EKAS EN ANDALUZUJO: NASKIĜAS LA ANDALUZIA JUNULARA ESPERANTO-UNUIĜO

La ciudad sevillí fue testigo de un evento histórico: el día 30 de enero del año 2025 nació una asociación de esperanto en la región española de Andalucía. Su nombre oficial es Unión Juvenil Esperantófona de Andalucía (en esperanto: Andaluzia Junulara Esperanto-Unuiĝo).

El nacimiento de esta asociación es el resultado del trabajo de un grupo de jóvenes de Andalucía, encabezado por Alvaro Burgos Escudero. La fundación de esta organización supone un gran paso para la promoción del movimiento esperantista en nuestra región y el nacimiento del movimiento juvenil representativo dentro de una estructura organizativa.

UEJA tiene como objetivo principal la colaboración con otras organizaciones, pero con especial interés en el ámbito de la educación. Además, se pretende organizar actividades culturales en diversas partes de nuestra provincia. Como primera actividad, UEJA publicó sus obras al día la semana pasada. El primer número de la revista de principios del siglo es la nueva bandera (en esperanto). El primer número de la revista de principios del siglo es la nueva bandera (en esperanto). El primer número de la revista de principios del siglo es la nueva bandera (en esperanto).

(Historialo, para que una lingua internacia la sia, ne es establiĝinta ĉiam.)



Andaluzia Junulara Esperanto-Unuiĝo
Unión Juvenil Esperantófona de Andalucía



La heliga reĝo Ĝozelo estis atenciva de historia objekto la 30-an de januaro de la 2025-a jaro, kiam juna Esperanto-ocio naskiĝis en la hispana regiono Andaluzio. Ĝia nomo estas Andaluzia Junulara Esperanto-Unuiĝo (esperanto: Andaluzia Junulara Esperantófono de Andaluzio).

La naskiĝo de tiu asocio estas la rezulto de longajda laborado, kiu establiĝis jamde, kio inkluzive estas Alvaro Burgos Escudero. Ĝia establiĝo signifas unuan paŝon por la promocio de la Esperanto-movado en nia regiono kaj por la naskiĝo de nova juna Esperanto-ocio.

AEUE celas kiel ĉefaj taskoj la kunlaborado kun aliaj Esperanto-ocioj, sed ĉefe en la edukado. Aldezi, oni intencas organizi kulturajn aktivajn en diversaj partoj de nia provinco. Kiel unua aktivado, AEUE publikis siajn verkojn la semajno antaŭe. La unua numero de la revuo de komenco de la 20-a jarcento estas la nova flago (en esperanto). La unua numero de la revuo de komenco de la 20-a jarcento estas la nova flago (en esperanto).

(Ĝi montras por ke lingvo internacia, ne ĉiam estas ĝi.)

COMIENZA UNA NUEVA ÉPOCA EN ANDALUCÍA: NACE LA UNIÓN JUVENIL ESPERANTÓFONA DE ANDALUCÍA

Redakto/Redaktejo: Alvaro Burgos Escudero

Andaluzia Junulara Esperanto-Unuiĝo estas nova asocio kiu celas kunigi la junularan esperantistaron en Andaluzio. Fondita en Granado ĉirkaŭ grupeto de universitataj studentoj scipovantaj la internacian lingvon, la nova asocio ankaŭ celas disvastigi Esperanton inter la andaluzia junularo.

AJEU jam disponas pri propra informilo, apranta en interreto, kun la nomo "La Suno Andaluzia". En la informilo, oni kundividis informojn pri la junulara movado en la tuta mondo. Do, se interesas vin la junulara movado en Andaluzio, ne hezitu kontakti kun ajeu@esperanto.ac

Dauriĝas la organizado de la 22-a Andaluzia Kongreso de Esperanto en Malago

Dauriĝas en Malago la laboroj cele la organizado de la 22-a Andaluzia Kongreso de Esperanto, okazonta samtempe al la 4-a NaturAmika KulturSemajno. Fine ambaŭ renkontiĝoj okazos de la 9-a ĝis la 12-a de oktobro 2026. Oni decidis, ke la Dioceza Domo estos la kongresejo. Temas pri taŭga loko, pro la fakto, ke tie povos okazi prelegoj, diskutoj, kulturaj prezentadoj kaj partoprenantoj ankaŭ povos manĝi kaj resti tie dum tiuj tagoj. Ĉe ĉi tiu sama domo jam okazis en la jaro 2019 la tiujara kongresoj hispana kaj andaluzia.

Kiel programeroj estis pripensitaj koncerto aŭ muzika prezento, ludoj kaj renkontiĝoj por favorigi amikemajn rilatojn kaj por praktiki la lingvon, ankaŭ prezentado de libro kaj prelegoj pri naturaj kaj andaluziaj temoj. Tre grava ĉapitro dum la kongreso estos la ekskursoj. Tiel, oni proponas agadojn por konatiĝi kun naturaj kaj historiaj trezoroj de la malaga provinco.

► Sabate la 10-an de oktobro, oni organizos ekskurson al "Caminito del Rey" (Vojeto de la Reĝo). Temas pri promen-pado tra monto-gorĝo, ekkonstruita komence de la 20-a jarcento, por faciligi la transporton de laboristoj kaj materialojn inter la akvofaloj de El Chorro kaj Gaitanejo. Inter la jaroj 2011 kaj 2015, oni riparigis la tutan padon, nuntempe estas eble promeni tra ĝi senprobleme kaj tute sekure. Hodiaŭ estas unu el la plej vizitataj turismaj lokoj en Andaluzio.


Do, kongresanoj povos, laŭ antaŭa enskribo, partopreni en ĉi tiu promenado, kie estos eble ĝui nekredablajn vidaĵojn.



Caminito del Rey / Promen-pado de la Reĝo

► Dimanĉe la 11-an de oktobro, oni organizos vizitojn al la vilaĝoj Nerho kaj Frigiliano. Temas pri belegaj turismaj vilaĝoj en la Aĥarkia regioneto de Malago. Nerho troviĝas apude al la Mediteranea Maro, kaj ĝi posedas unu el la plej belaj kaj vizitindaj lokoj de la provinco: la groto de Nerho, malkovrita en la jaro 1959, sed formitaj de la Naturo antaŭ pli ol 42.000 jaroj.

Siafoje, Frigiliana estas ĉarma kaj vizitinda vilaĝeto en tiu sama regiono. Ĝi estas konsiderata kiel unu el la plej belaj vilaĝoj en Hispanio.



Groto de Nerho

/

Tipa strato en Frigiliano

► Por tiuj kiuj deziras plilongigi sian restadon en Andaluzio, la organizantoj proponas postkongresan ekskursojn.

- La unua okazos en la belega kaj historia urbo Arundo (*Ronda* en la hispana lingvo) kaj en la apuda vilaĝeto Setenil de las Bodegas. Arundo sidas sur ebenaĵo tranĉata de profunda gorĝo fosata de rivero. Tio donas al la urbo pitoreskan panoramon kiu, kunigita al la riĉa monumentaro kiujn ĝi posedas kaj ties naturan ĉirkaŭon, igas ĉi tiun urbon unu el la plej belaj turismaj allogaj lokoj de la tuta Andaluzio.

Rilate al Setenil de las Bodegas, ĝi estas vilaĝeto proksime al Arundo. Ĝia granda allogaĵo konsistas en tio, ke multaj domoj estas konstruitaj sub kaj eĉ ene de enormaj rokaĵoj, tio havigas al la loko mirindan aspekton.



Nova Ponto en Arundo



/ Tipa strato en Setenil de las Bodegas

- Dua proponita ekskurso, por tiuj kiuj deziras plilongigi sian restadon en Andaluzio post la kongreso, okazos al la hispana nord-afrika urbo Ceŭto. Trans la Ĝibraltara Markolo troviĝas ĉi tiu urbo, kie miksiĝas Eŭropo kaj Nord-afriko kun belaj kaj tipaj vidindaĵoj, ne forgesante, ke temas pri sendogana teritorio kie eblas senimposte butikumadi.



Ceŭto


Kiel dirite, ĉe la kongresejo estos eble resti. Do, vi povas rezervi ĉambrojn, jen la kondiĉoj:

- Individua ĉambro (75€ tage).
- Duopa ĉambro (65€ persono/tage).

Atentu, tranoktado en la kongresejo inkluzivas kompletan pensionon (matenmaĝon, tagmanĝon kaj vespermanĝon). Sufiĉe malmultekoste, ĉu ne?

Oni povas rezervi minimume 2 noktojn kaj maksimume 3, de la 9-a ĝis la 12-a de oktobro. Se estas bezonataj pliaj noktoj, estus necese kontakti kun la organizantoj de la kongreso.

Mendo de loĝado ĉe la kongresejo (Dioceza Domo) estos akceptita nur ĝis elĉerpo de dispon-ebleco de ĉambroj. Kompreneble, en la urbo Malago ankaŭ estas granda nombro da loĝlokoj, troveblaj memstare per konataj retaj platformoj.



Duopa ĉambro ĉe la Dioceza Domo

Do, se vin interesas la 22-a Andaluza Kongreso de Esperanto, vi povas peti pliajn informojn al la ret-adreso: 22andakongreso@esperanto.ac

La aliĝilo jam estas trovebla ĉe: www.esperanto.ac

**VERDA LINGVO
POR VERDA NATURO**

Esperanto por daŭripova mondo

4a
NaturAmika
KulturSemajno
en Esperanto

ESPERANTA
NATURAMIKARO

AEU
Asociación Española de Esperanto

22a Andaluza
Kongreso de
Esperanto

REAKTIVIĜIS LA BANKO-KONTO DE ANDALUZIA ESPERANTO-UNUIĜO

Post kelkaj problemoj kun la banko okaze de la administrado de nia banko-konto, ni plezure informas al niaj membroj kaj simpatiantoj, ke la banko-konto:

Caixabank IBAN ES74 2100 7234 6713 0048 0698

Reaktiviĝis!

Se vi apogas kaj deziras kunlabori kun la Esperanto-movado en Andaluzio, ni proponas al vi membriĝi en Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. La jara kotizo estas 20 €, pageblaj en tiu banko-konto. Ni petas al vi, post la pago, sendi ret-mesaĝon al info@esperanto.ac, por informi pri la pagita kotizo. Multan dankon kaj ni kalkulas kun via kunlaborado.



VUELVE A ESTAR ACTIVA LA CUENTA DE LA ASOCIACIÓN ANDALUZA DE ESPERANTO

Después de algunos problemas con la entidad bancaria por la gestión de nuestra cuenta bancaria, anunciamos a todos nuestros socios y simpatizantes que la cuenta:

Caixabank IBAN ES74 2100 7234 6713 0048 0698

¡ Vuelve a estar activa !

Si apoyas y quieres colaborar con el movimiento esperantista en Andalucía, te invitamos a hacerte miembro de la Asociación Andaluza de Esperanto. La cuota anual es de 20 €, que puedes abonar en la cuenta antes indicada. Te rogamos que tras hacer el pago envíes un correo electrónico a info@esperanto.ac, informando del abono de la cuota.


Muchas gracias y contamos con tu colaboración.

LOQVERISNE LATINE?: KIAMANIERE EŬROPAJ KLASIKAJ LINGVOJ DAŬRE FLORAS

Kiam oni pensas pri mortintaj lingvoj, sendube oni mencias la antikvan grekan kaj latinon, i.a. Tial, oni false kredas, ke tiujn lingvojn parolas neniu en la Tero (aŭ ekster la Tero!). La realo nin montras, ke ambaŭ lingvoj ankoraŭ floras kaj verkoj estas ĉiujare eldonataj en ambaŭ lingvoj. Ni esploru en ĉi tiu artikolo pri la kielo kaj la kialo.

Unue, direndas, ke la antikva greka kaj latino estas ja mortintaj lingvoj. Tio signifas, esence, ke ili ne plu evoluas. Alivorte, la fonetiko, sintakso kaj vortprovizo restas la samaj. Malgraŭ tio, estas kovene, ke ni aldonu detaleton. La antikva greka kaj latino estis kaj, miaopinie, daŭre estas gravaj iloj por la civilizado en ĉiuj kvin kontinentoj, precipe en Eŭropo kaj Ameriko. Dum multaj jarcentoj, homoj el malsamaj regnolandoj legis, diskutis kaj verkis en komuna lingvo: latino. Aldone, ili vaste legis librojn, sed ne tiom ofte publikigis, ankaŭ en la antikva greka, la lingvo de Platono kaj Aristotelo, kies filozofioj estas la bazoj de pli granda sistemo. Tiajn lingvojn kaj aŭtorojn kaj ties librojn oni ankoraŭ studas en lernejoj kaj universitatoj pro la graveco en niaj vivoj, precipe en niaj juraj kaj politikaj sistemoj.

FAMILIA ROMANA: COLORES



Do, kiamaniere floras la antikva greka kaj latino nun? Verdire, ambaŭ klasikaj lingvoj estas amataj de amaso da homoj en ĉiuj landoj. Tia amo estas realigita en formo de libroj eldonataj preskaŭ ĉiujare. La hispana organizo Cultura Clásica (Klasika Kulturo) estas unu el la plej aktivaj eldonantoj de libroj en klasikaj lingvoj.

Temas, ĉefe, pri bonkvalitaj lernolibroj uzataj en lernejoj kaj universitatoj en la tuta mondo. Krome, estis publikigitaj vortaroj pri modernaj konceptoj, kiuj ne ekzistis antaŭe. Ekzemple, eblas nun diri aŭtomobilon latine (*autoraeda*, se vi scivolemas!) kaj estas latinlingva versio de Vikipedio, kie oni povas legi pri la lastaj okazintaĵoj kaj pri ĉiaspecaj imageblaj aferoj; bedaŭrinde ne ekzistas ekvivalento en la antikva greka. Verŝajne, estas strange paroli en la antikva greka kaj latino pri nunaj okazaĵoj, sed ja eblas, eĉ legi Harry Potter en la lingvo de Cicerono kaj en tiu de Platono! Oni ne nur daŭre eldonas librojn, sed oni tiel same starigas klubojn en la tuta mondo. Mi parolas pri *circuli* (*circulus* singulare), kiuj estas kluboj kie oni parolas precipe latinon kaj, kelkfoje, ankaŭ la antikvan grekan. En nia nacio, Hispanujo, ekzistas tiaj kluboj preskaŭ ĉie (vd.: <https://mallonge.net/21p>).



Estas surprize vidi, ke estas kluboj en kvar kontinentoj; eĉ en Ĉinujo kaj Japanujo eblas renkonti homojn kaj paroli latine! Mi mem partoprenis en latinoklubo bedaŭrinde ne plu ekzistanta en Granado antaŭ ol la pandemio ĉion kaj ĉiujn difektis. Mia sperto estis ege plaĉiga, ĉar oni traktas latinon kiel alian vivantan lingvon; oni diskutas pri literaturo, sed ankaŭ pri nunaj okazaĵoj (ekz.: militoj, ekonomio, politiko...). Aldone al ĉio, ekzistas podkastoj (latine, *Rara avis*, kaj, en la antikva greka, *Ancient Greek with Argos*), eta novaĵagentejo (*Ephemeris*: <https://ephemerisnuntii.eu/>) kaj lernejo kies veturila lingvo estas latino (*Accademia Vivarium Novum*, en Italujo). Se vi volas aŭskulti fluan parolanton de latino (kun eklezia prononcado), mi rekomendas al vi atente spekti jenan filmeton: <https://mallonge.net/21q>

Laŭ Luigi Miraglia:

«Lingua latina est mortua, hac de causa est facta immortalis, quia est instrumentum optimum, quo non solum cum aequalibus nostris possumus loqui, sed cum iis qui nos praecesserunt».

Esperante:

«Latino estas mortinta kaj, pro tio, senmorta, tial, ke ĝi estas perfekta ilo por paroli ne nur kun niaj samtempuloj, sed ankaŭ kun tiuj, kiuj nin antaŭradis».

Laste, sed ne balaste, Luigi Miraglia en la jaro 2012 opiniis, ke en la tuta mondo estis almenaŭ 10.000 latinparolantoj, direndas, tamen, ke ne ĉiuj estas fluaj parolantoj. Pri la antikva greka, ni ne havas datumojn.

Et tu, loquerisne latine?

Σὸ δὲ Ἑλληνιστὶ λαλεῖς;

ESPERANTICUS SERMO IMMORTALI EQUITI DON QUIJOTE COMPLUTI VOCEM PRAEBEBIT



Compluti (notissima ob fictum natalem Michaelis de Cervantes Saavedra Matritensi urbe) a die septimo usque ad diem decimum mensis Iulii **LXIV Hispanicus Esperantici Sermonis Conventus**, nunc temporis dicatus immortalis operi cervantino et eius ad linguam esperanticam translationi in commemorationum **IV Centenarii** gremio fiet.

Idcirco duae monstrationses visi poterunt, quarum altera nomine "*Sic ego video Don Quijote*" frequentes delineationes de mirifica egregiaque equitis persona a pueris puellisque confectas praebabit, altera autem "*Esperanticus sermo in litteris et litterae in esperantico sermone*" nominata, ex duabus partibus constat: quarum in altera litterariorum operum (Hispanorum neve) loci explanabuntur in quibus lingua esperantica refertur, altera autem librorum in esperantico sermone exaratorum collectionem

Alejandro Burgos Escalante (alejandroabe@proton.me)



En esperanto la forma más usual de pedir amablemente algo es utilizar el verbo que empleamos para pedir en imperativo, mientras que el verbo de la acción que queremos que se realice va en infinitivo. Veamos algunos ejemplos:

- *Bonvolu sidiĝu ĉi tien!*

¡Por favor siéntate aquí!

¹ Se utiliza el acusativo de dirección en "*ĉi tien*", en vez de "*ĉi tie*", porque la petición implica el movimiento de la persona, que debe dirigirse del lugar donde se encuentra a otro, donde está situada la silla. De todos modos, también podría decirse "*ĉi tie*".

- *Volu fermi tiun fenestron!*

¡Por favor, cierra esa ventana!

No es extraño encontrarse con ambas formas verbales en imperativo, por ejemplo: *Bonvolu venu!* Sin embargo, esto no es correcto, la forma del verbo que solicita algo debe ir en imperativo y lo que se pide en infinitivo.

Como curiosidad hay que decir, que el propio creador de la lengua, el Dr. L. Zamenhof, nunca usó el verbo "*bonvolu*", solo "*volu*". Ha sido el uso continuado del idioma el que cambió el verbo *voli* por *bonvoli*, que es una forma más amable de solicitar algo.

Veamos algunos ejemplos más:

- *Bonvolu ne doni manĝaĵojn al bestoj en la parko!*

¡Por favor no dé comida a los animales en el parque!

- *Volu uzi la sekur-zonon se vi vojaĝas en aŭtomobilo!*

¡Por favor use el cinturón de seguridad si viaja en automóvil!

Si usamos el imperativo *Bonvolu* o *Volu* para pedir algo, a continuación utilizaremos siempre un verbo en infinitivo: *Bonvolu veni baldaŭ!*

Por supuesto no son estas las únicas maneras de pedir algo amablemente, así, convirtiendo los verbos *voli* o *bonvoli* en adverbios, es decir *vole* o *bonvole*, sí podemos usar el imperativo del verbo de la acción que solicitamos, de este modo, no suena la petición como una orden, sino como un ruego. Veamos algunos ejemplos:

- *Bonvole venu ĉi tien kiel eble plej rapide!*
¡Por favor, ven aquí lo más rápidamente posible!
- *Vole malfermu la pordon, mi atendas miajn invititojn.*
¡Por favor, abre la puerta, espero a mis invitados!

Otra forma sería utilizar la frase "*mi petas*", que literalmente significa "yo pido", pero en este contexto es más conveniente traducirlo también como "por favor". En este caso sí volvemos a utilizar el verbo en imperativo. Ejemplos:

- *Venu ĉi tien, mi petas!* ¡Ven aquí, por favor!
- *Mi petas vin, ne donu manĝaĵojn al la bestoj!*
¡Por favor, no dé comida a los animales!

Si usamos *mi petas* para pedir algo, utilizaremos siempre un verbo en imperativo:

Venu baldaŭ, mi petas!

Los verbos *Voli*, *Bonvoli* o *Peti* no son los únicos que se utilizan para pedir algo cortesmente. Así encontramos el verbo *Esti* cuando va acompañado de algunos adjetivos. Veamos algunos ejemplos:

- *Ĉu vi volas esti tiel afabla silenti? Infanoj dormas.*
¿Quiere ser tan amable de guardar silencio? Los niños duermen.
- *Estu afabla, silentu!* ¡Sea amable, guarde silencio!

- *Ĉu vi estas tiel kompleza ne ripeti tiujn vortojn?*
¿Tiene la amabilidad de no repetir esas palabras?
- *Estu kompleza, ne ripetu tiujn vortojn!*
¡Sea amable, no repita esas palabras!
- *Ĉu vi estas tiel galanta lasi min eniri?*
¿Es usted tan galante de dejarme pasar?
- *Estu galanta, lasu min eniri!*
¡Sea galante, déjeme pasar!



- *Ĉu vi estas tiel ĝentila helpi min leviĝi?*
¿Eres tan gentil de ayudarme a levantarme?
- *Estu ĝentila, helpu min leviĝi!*
¡Sé gentil, ayúdame a levantarme!



Rimo LIII

*Venos re la hirundoj obskur-plumaj
fari nestojn ĉe vi, ĉe la balkon',
kaj denove flugile sur la vitron
frapetos kun petol'.*


*Tamen tiuj vidintaj lantafluge
min feliĉa kaj vin en belo-glor'
kaj lernintaj parkere niajn nomojn,
por ĉiam iris for!*

*Venos re lonicero grimpe rampe
kovri muron ĝardenan per feston',
kaj denove pli belos ĝiaj floroj
en lasta taga hor'.*

*Tamen tiuj trempitaj en malseko,
kies gutojn el freŝa, trema ros'
ni rigardis defali larmoforme,
por ĉiam iris for!*

*Venos re al orelo via flustri
susuretoj de arde ama ton';
eble, el la profunda dormo sia
vekiĝos via kor'.*

*Tamen mute, fervore, surgenue,
kiel antaŭ altaro, en ador',
kiel mi vin amegis, nu, tiele
vin amos nul person'!*



Gustavo Adolfo Bécquer
1836 ~ 1870



Gustavo Adolfo Bécquer

Tradukis: Fernando de Diego


Kermeso aŭ Foiro



Cirko



Budo



Ligna ĉevalo



Fervoja tobogano / Ondofervojo




Karuselo



Vagono



Kolizaŭtoj



Fortometro



Ĉenkaruselo

Nacelo




Pendsidilo

Radego



Boatbalancilo



Lotumejo



Balonetoj



Tentakla karuselo




Sukernubo



Sukerstangoj



Pendolkaruselo



Celjetado al skatoloj



Sorĉistin-vagonaro



Folioj por praktikado

Kvin infanoj samtempe

Myrtis Smith (Usono)

La 28-an de majo 1934, kanada virino kun la nomo **Elzire Dionne faris ion, kion neniu tiam kredis ebla**: ŝi sukcese **naskis** kvin ĝemelinojn. Iliaj nomoj estis Yvonne, Annette, Cécile, Émilie kaj Marie. La knabinoj estis identaj, ĉar ili ĉiuj devenis de unu sola ovo-ĉelo. Ili fariĝis famaj **tra la tuta mondo**, ĉar neniam antaŭe oni aŭdis pri kvin ĝemeloj, kiuj postvivis siajn unuajn monatojn.

La beboj naskiĝis tro frue kaj estis tre malgrandaj. Ili naskiĝis en simpla kampara domo sen modernaj **medicinaj iloj, helpe de** loka kuracisto kaj du akuŝistinoj.

Kiam homoj aŭdis pri la nasko, helpo **venis el ĉie** en Nordameriko. Homoj sendis vestojn kaj aliajn **bezonaĵojn**, kaj eĉ donacis patrinan lakton. Sed en la jaro 1934 regis granda ekonomia krizo, kaj prizorgi kvin tro frue naskitajn bebojn estis tre multekoste. Kiam la ĝemelinoj havis kvar monatojn, iliaj gepatroj subskribis interkonsenton kun la Ruĝa Kruco, kiu transprenis ilian prizorgadon.

En marto 1935, la kanada registaro subskribis apartan leĝon, laŭ kiu la ŝtato transprenos la knabinojn, **ĝis ili atingos 18 jarojn**. Speciala hejmo estis konstruita por ili. Ĝia celo estis **loĝigi** kaj **prizorgi la knabinojn**, sed baldaŭ la ĝemelinoj fariĝis granda turisma allogaĵo. Homoj vojaĝis el la tuta mondo por rigardi la fratinojn **tra unudirektaj fenestroj**. Novaĵfilmoj, filmoj kaj reklamoj uzis iliajn vizaĝojn, **gajnante** milionojn da dolaroj.

La fratinoj Dionne estis konstante observataj, kontrolataj kaj studataj. Ĉio, kion ili faris, estis registrita. Multajn jarojn poste la fratinoj diris, ke iliaj infanaj jaroj estis tre malfacilaj, kaj ke **oni ne traktis ilin kiel normalajn infanojn**.

> La 28-an de majo 1934

Para indiciar fechas en esperanto utilizamos el número ordinal (-a) en acusativo, ejemplo:

- *La 1-an de majo okazas la festo de la laboristoj.*

El 1º de mayo tiene lugar la fiesta de los trabajadores.

> Elzire Dionne faris ion, kion neniu tiam kredis ebla

Nos encontramos con dos frases, una subordinada a la otra. Elzire Dionne hizo algo (*ED faris ion*). La siguiente explica lo que hizo: "lo que nadie entonces creía posible" (*kion neniu tiam kredis ebla*). *Kion* en la segunda frase va referido al *Ion* de la primera. Veamos algunos ejemplos más.

- *Li petis al mi ion, kion mi konsideras absurdaĵon.*
Él me pidió algo, que considero un absurdo.
- *Vi plenumis nenion, kion vi pasintjare promesis.*
No has cumplido nada, (de lo) que prometiste el año pasado.

> naski

El verbo *naski* significa "dar a luz", "parir" y evidentemente es transitivo porque se da a luz a alguien. Del verbo *naski* se forma *naskiĝi*, que se traduce por nacer. Veamos algunos ejemplos:

- *Ŝi naskis belan infanon en la hospitalo.*
Ella dio a luz un bello niño en el hospital.
- *Bela infano naskiĝis en la hospitalo.*
Un bello niño nació en el hospital.

> tra la tuta mondo

Se traduce como "por todo el mundo". En español se suele utilizar la preposición "en", que también sería correcta en esperanto. Sin embargo con la preposición "tra" se da la idea de algo que recorre y no solo que está.

> medicinaj iloj

Recordemos el sufijo "-ilo", que significa "instrumento". Generalmente actúa como sufijo, ejemplo: *laborilo* = herramienta de trabajo. Pero también puede actuar como un sustantivo más. En este caso va precedido del adjetivo "*medicina*", que significaría "relativo a los médicos, a la medicina". Así que *medicinaj iloj* podría traducirse como "instrumentos médicos".

> helpe de

Se traduce como "con ayuda de". Recordemos las grandes posibilidades que los adverbios (-e) le dan al esperanto. Así podría decirse "*kun la helpo de*" o simplemente "*helpe de*".

> **venis el ĉie**

Recordemos el cuadro de voces simples, en el que la raíz *ĉi* significa todo, mientras que la terminación *-e* da idea de lugar. Así *ĉie* podría traducirse por "todos lados". Encontramos en esta frase también la preposición "*el*", cuyo significado es "de" con la idea de origen. Así *helpo venis el ĉie* podría traducirse como "la ayuda vino de (desde) todos lados".

> **bezonaĵojn**

Recordemos el sufijo "*-aĵ*" que expresa la idea de "cosa". El verbo *bezoni* significa "necesitar", por lo que *bezonaĵoj* sería las "cosas que se necesitan".

> **ĝis ili atingos 18 jarojn**

Se traduce por "hasta que ellas alcancen 18 años". Las preposiciones en esperanto ya llevan incluido el sentido de "que" o "cuando", así no es necesario decir "*ĝis ke*" o "*ĝis kiam*".

> **loĝigi**

El verbo "*loĝi*" (habitar, vivir, residir) es intransitivo, es decir no va acompañado de objeto directo. Pero lo podemos convertir en transitivo si le añadimos al sufijo "*ig*", que da la idea de "hacer, facilitar...". En este caso mientras *loĝi* es residir, así *loĝigi... la knabinojn* sería "alojar o albergar a las chicas". Veamos algunos ejemplos más del sufijo *-ig*:

- *Infanoj ne estas adultaj, sed la tempo adultigos ilin.*
Los niños no son adultos, pero el tiempo les hará adultos.
- *Luno ne brilas, sed Suno briligas ĝin.*
La Luna no brilla, pero el Sol la hace brillar.

> **prizorgi la knabinojn**

Algunos verbos "exigen" el uso de determinadas preposiciones, por ejemplo si usamos el verbo *paroli*, lo más lógico es usar luego *pri*, así *paroli pri* sería "hablar sobre...hablar de..." Lo mismo ocurre con el verbo *zorgi* (cuidar). Siempre se cuida de alguien, así decimos *mi zorgas pri mia filo* (cuido de mi hijo). Pero podemos decirlo también de otra manera. Podemos unir la preposición al verbo "*prizorgi*" y a continuación usamos el acusativo. Veamos algunos ejemplos:

- *Zorgi pri la knabinoj.* Cuidar de las chicas.
- *Prizorgi la knabinojn.*
- *La ĝardenisto zorgas pri la floroj.* El jardinero cuida de las flores.
- *La ĝardenisto prizorgas la florojn.*

> **tra unudirektaj fenestroj**

Al igual que en español, los números también puede actuar como prefijo. Así, encontramos palabras como "unidireccional" (1), "bifocal" (2), "tricornio" (3), "tetraarca" (4)... Pues en esperanto ocurre igual, tan solo tendremos que anteponer el número delante de, en este caso, el adjetivo. De este modo podemos traducir *tra unudirektaj fenestroj* como "a través de unas ventanas unidireccionales". Veamos algunos ejemplos más:

- *Mi loĝas en duetaĝa konstruaĵo.*
Yo vivo en un edificio de dos plantas.
- *Polpo estas oktentakla mara besto.*
El pulpo es un animal marino de ocho tentáculos.

> **gajnante**

Recordemos que la forma del gerundio en los verbos se forma añadiendo las siguientes terminaciones:

- *gajninte*: habiendo ganado (gerundio en pasado).
- *gajnante*: ganando (gerundio en presente).
- *gajnonte*: habiendo de ganar (gerundio en futuro).

> **oni ne traktis ilin kiel normalajn infanojn**

Podemos traducir esta frase como: "no se les trató como niños normales". El acusativo de "*normalajn infanojn*" nos remite a "*ilin*", que también va en acusativo. De este modo podemos saber que son ellos los que no son considerados así. Si se hubiera dicho "*normalaj infanoj*", es decir si no fuera en acusativo, entonces se estaría refiriendo al sujeto "oni".



Turismi en ...

CORIA DEL RÍO (Sevilo)

Coria del Río situas je 12 kilometroj for de Sevilo, temas pri urbo kies identeco estas tute ligita al la rivero Gvadalkiviro, kiu bordas ĝian orientan flankon kaj difinas ĝian historion kiel riveran havenon kaj naturan pordegon al marĉoj de Donjano. La reliefo de la urbo kombinas la mildan altigon de la montetoj de la regioneto Alharafo en Sevilo kun la malaltaj fekundaj teroj de la riverbordo. Temas do, pri enklavo inter la granda sevila urbo kaj la natura medio de la Parko Donjano.

Kvankam ekzistas restaĵoj pri homoj en la zono dum la paleolitika periodo, la grava urba kerno komenciĝis kun la fenicoj, kiuj nomis

ĉi tiun vilaĝon kiel *Caura*. Por tiu marista popolo, la montento *San Juan* estis elstara komerca loko por kontroli la riveran trafikon kaj la interŝanĝon de metaloj. Post trapaso de kartaganoj, romianoj alvenis kaj ili transformis la urbon en *Caura Siarum*. Dum tiu epoko, Coria fariĝis prospera centro por produktado de oliv-oleo kaj ceramiko, eksportante produktojn al la tuta Imperio per la rivera vojo.

Tamen, post la falo de Romo kaj mallonga visigota periodo, la jaro 844 markis dramatan mejloŝtonon, kiam vikinga invado supreniris la riveron kaj prirabis la tutan zonon, antaŭ ol esti venkitaj de la omejadaj trupoj en la batalo de Tablada.

Dum la al-andalusa epoko, sub la nomo *Qawra*, la vilaĝo rehavis sian brilon kiel defendan bastionon de Sevilo. En la 13-a jarcento la urbo estis konkerita de la kastilia reĝo Alfonso la 10-a la Saĝulo. La monarko, konscianta pri la taktika valoro de la loko, reloĝigis ĝin per katalunoj kaj aragonanoj.



Blazono de Coria del Río

Post la kastilia konkero Coria del Rio troviĝis sub la regado de la Ordeno de Santiago kaj, poste, sub la kontrolo de la Duko de Alba. Dum la frua moderna epoko, ĝia haveno estis gravega por la provizado de Seviljo dum la Ora Jarcento, ĝi funkciis kiel haltejo por ŝiparoj kiuj komercis kun Ameriko. Sendube la plej unika evento okazis en 1614 kiam la japana ambasado Keichō, gvidata de la samurajo Hasekura Tsunenaga, alvenis en Coria del Río. Ties membraro decidis resti en la urbo, naskiĝis tiam la familinomo *Japón*, por la idaro de tiuj japanoj, hodiaŭ centoj da enloĝantoj de Coria del Rio havas tiun nomon.

En la nuntempa epoko, Coria evoluis de terkultura kaj fiŝkaptista socio al dinamika municipo ene de la metropola aero de Seviljo. Hodiaŭ la urbo ekvilibrigas sian industrian modernigon kun la konservado de siaj

Monumentoj

Preĝejo de Sankta Johano

Sur la plej alta punto de Coria del Rio troviĝas ĉi tiu preĝejo, mudeharstila, starigita dum la 15-a jarcento. La ĝusta loko jam estis antikva fenica kaj romia setlejo. De ĉi tiu loko oni povas ĝui belegajn vidojn al Gvadalkiviro kaj al la tuta regiono.

Paroĥejo de Nia Sinjorino de la Stelo

Temas pri la koro de la vilaĝo. Konstruita origine en la 14-a jarcento, ĝi estas juvelo de la gotika-mudehara stilo. Elstaras ĝia svelta sonorilturo kaj, interne, la ĉefaltaro kune kun diversaj bildoj de granda arta kaj religia valoroj, tre ligitaj al la loka Sankta Semajno.

Monumento al Hasekura Tsunegana



Monumento al Hasekura Tsunenaga

Sur la promenejo Carlos de Mesa, apud la rivero Gvadalkiviro, stariĝas monumento honore al Hasekura Tsunenaga, simbolo de la kunfratiĝo inter Coria del Río kaj Japanio. Temas pri bronza statuo de la samurajo, kiu gvidis la ambasadon Keichō en la jaro 1614. Ĝi estas pilgrimejo por japanaj turistoj kaj centroj de la kulturaj agoj, kiuĵ festas ĉi tiun historian ligon.

Domo-Muzeo de Blas Infante

Ĝuste ĉe la limo kun la vilaĝo La Puebla del Río, stariĝas la domo de Blas Infante, patro de la andaluzia patrujo, kiu nomiĝas en la araba lingvo *Dar al-Farah* (Domo de la ĝojeco). Ĝi estis konstruita sub al-andalusa stilo kaj ĝiaj ĝardenoj estas nepre vizitendaj por kompreni la politikan kaj kulturen identecon de Andaluzio.



Muzika Kiosko kaj la Rivera Promenejo

Pli ol fermita monumento, la riverborda promenejo kun sia tradicia fera muzika kiosko reprezentas la

esencon de Coria. Ĝi estas la renkontiĝejo antaŭ Gvadalkiviro, kie oni povas observi la pasadon de la ŝipoj kaj senti la pulson de popolo, kiu daŭre vivas vizaĝ-al-vizaĝe kun sia rivero.

Festoj

Festo de la Alburno

La 1-an de majo okazas granda gastronomia evento en Coria del Río. Temas pri festo por honori la alburnon, tipa fiŝo de la rivero Gvadalkiviro, kaj la tradicion de la lokaj fiŝkaptistoj. Loĝantoj kaj vizitantoj renkontiĝas por gustumi tiun fiŝon frititan aŭ en marinado.

Sankta Semajno (Pasko)

Kiel en preskaŭ ĉiuj vilaĝoj en la sevila provinco, la paskaj festoj kaj ties religiaj procesioj estas tre intense celebrataj. Kunfrataroj kiel "El Cerro" aŭ "La Soledad" organizas kun granda beleco procesiojn kun miloj da homoj.

Ceremonio de la lanternoj

La Ceremonio de la Lanternoj, (*Tōrōnagashi* en la japana lingvo) okazas somere (kutime en aŭgusto) por memori la ligon de Coria del Río kun Japanio.

Sekvante la japanan tradicion, oni metas lanternojn sur la riveron Gvadalkiviron memore al la animoj de la prauloj. La rivero lumiĝas per centoj da malgrandaj lumoj, kreante poezian bildon, kiu allogas homojn el ĉiuj lokoj.

Gastronomio

La gastronomio de Coria del Río havas la riveron Gvadalkiviron kiel ĉefan provizejon. Nediskutebla ĉefrolo apartenas al alburno, rivera fiŝo kiu estas kuirita frite aŭ en marinado, preparado nur en salo ankaŭ estas tre ŝatata. Antaŭe, sturgo kaj ties altvalora kaviaro estis grava ekonomia motoro de la regiono, tio lasis heredaĵon de kuirartaj pladoj, kiuj ankoraŭ estas memorataj.

Krom pro la riveraj receptoj la gastronomio de Coria del Río estas ankaŭ konata pro la *sopeaos*, loka varianto de gazpaĉo, kun panpecoj kaj legomoj. Bongustaj ankaŭ estas la salikoketoj.

Se paroli pri dolĉaĵoj, estas tre famaj la *morterás* kaj la monaĥejaj sukeraĵoj. Ĉio ĉi estas akompanata de la vinoj de la apuda regiono Alharafó.

Lanternoj sur la rivero Gvadalkiviro



Venontnumere Turismi en ... Trevélez (Granado)





Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio.

Emilio Castellano Vita, klara granadano.

Emilio Castellano Vita naskiĝis en Granado en la jaro 1888, ĉe familio de la vilaĝo Baza, kiu posedis kukvendejon. En Granado li komencis studi la juran karieron, kvankam kiam li komencis la duan kurson, li iris en Madridon. Tie, li kontaktis kun elstaruloj de la *Institución Libre de Enseñanza*, progresema eduk-institucio en Madrido.

En tiu urbo li lernis la lingvojn francan, anglan kaj esperantan. En la jaro 1902 li finis siajn universitatajn studojn, tiam li decidis reveni en la vilaĝon Baza kun la celo mastri la familian negocon. En sia vilaĝo li ankaŭ laboris kiel profesoro pri etiko kaj lingvoj en la mezgrada lernejo. Same, kvankam li neniam agadis kiel advokato malgraŭ la plenumotaj studoj, li de tempo al tempo redaktis jurajn informojn post peto de konatuloj. Pro tiuj agadoj li estis tre konata en la kultura, socia kaj ekonomia etoso de Baza.

Emilio Castellano profunde studis ĉion rilatan al la kulturo kaj



Emilio Castellano Vita
1888 ~ 1955


historio de sia vilaĝo. Ĉe lia propra domo li organizis privatan arkivon. Kiam eksplodis la civila milito en Hispanio en la jaro 1936, la domo de Emilio Castellano estis okupata kaj tie la komunisma partio instalas sian lokan sidejon. La familio rifuzis foriri el la domo, do ili devis iri en la plej altajn etaĝojn. Fine ili estis enkacerigitaj.

Kiam la milito finiĝis li neniam eltiris profiton de sia statuso de eksa

politika persekutito, male, li helpis ĉiujn en Baza, tie li sin dediĉis al la kolektado de ĉiuj dokumentoj kaj historiaĵo rilate sian vilaĝon. Li eĉ proponis la fondiĝon de municipa arĥivo kaj muzeo, kvankam tiusence li ne sukcesis. Rilate la internacian lingvon, Esperanton li lernis dum sia restado en Madrido, kie li sekvis siajn

universitatajn studojn. En la jaro 1914 li aliĝis al Universala Esperanto-Asocio kaj li fariĝis UEA-delegito en Baza (Granado). Dum sia tuta vivo li intense korespondis kun esperantistoj el la plej foraj landoj.


Emilio Castellano Vita forpasis en Baza en la jaro 1955.




Baza (Hispanio, Granada). 18000.
D: EMILIO CASTELLANO VITA, advokato, 5 Alhondiga.

Membro-karto de UEA de S-ro Emilio Castellano Vita de la jaro 1914.
Aperas ankaŭ enskribo kiel Delegito de UEA en Baza (Granado) en la jaro 1922.







$E = mc^2$ *Scienca Angulo*

La volvlibroj de Herkulano

La erupcio de la vulkano Vezuvio en la jaro 79 p.K. estas memorata ĉefe pro la tragika sepultado de la urbo Pompejo sub cindropluvo. Tamen, la apuda urbo Herkulano havis malsaman sorton, ĝi estis entombigita de piroklastaj fluoj je ekstremaj temperaturoj. Sed, paradokse, ĉi tiu terura cirkonstanco permesis esceptan konservadon en tiu urbo.

Inter la trezoroj trovitaj el ĝiaj ruinoj elstaras la Vilao de la Papiroj, la sola loko kiu lasis al ni, iamaniere, sendifektan bibliotekon de antikvaj epokoj, kun proksimume 1800 papirusaj rulaĵoj, konataj kiel "la volvlibroj de Herkulano".

La granda defio de ĉi tiuj dokumentoj estas ilia fizika stato. Pro la ekstrema varmo kaj la manko de oksigeno la volvlibroj ne tute forbrulis, male, ili suferis procezon de karbiĝo. La rezulto estis nigraj kaj fragilaj cilindroj, similaj al ligno-karberoj, kiuj dispeciĝas okaze de simpla kontakto.

Dum jarcentoj la provoj malfaldi ilin provokis neeviteblan detruon de granda parto de la materialo. Do, restis



Laŭidea bildo de la urbo Herkulano kaj la vulkano Vezuvio

nur malkonektitaj fragmentoj de tekstoj. Kompreneble, historiistoj seniluziiĝis, ĉar ili revis pri ebla reakiro de perditaj verkoj de la grekaj filozofio kaj literaturo.

Tamen, en la 21-a jarcento, teknologio atingis ion, kio ŝajnis neebla. Dank'al komputila tomografio per ikso-radioj kaj la uzo de artefarita inteligenteco, komenciĝis procezo de "virtuala malfaldado". En la jaro 2023 oni malkovris, ke la sekigita inko lasas specifan teksturon sur la volvlibroj. Poste, algoritmoj lernis rekoni tiujn teksturojn, eĉ kiam ne aperis videbla koloro. Danke al tio, 21-jara usona studento, Luke Farritor, sukcesis deĉifri la unuan kompletan vorton "πορφύρα" (porfira), kiu signifas "purpuro".

Por ĉi tiu tasko oni uzas skanilojn de ikso-radioj treege potencajn, similajn al tiuj de hospitaloj. Ĉi tiuj iloj estas ege sentemaj, ĉar la tiama inko estis karbo-bazita kaj la volvlibro mem estas karbigita. Tiel, inko kaj papiro estas preskaŭ sama aĵo, tamen la skanilo permesas vidi ion, kio ne aperus klare per nuda okulo.



Unu el la volvlibroj trovitaj en Herkulano

Per speciala informadika programo, esploristoj kreas 3D-modelon de la rulaĵo. Tiu programo “platigas” ciferece tiujn kurbajn tavolojn por transformi ilin en platan surfacon, kvazaŭ oni malfaldus virtualan mapon ne tuŝante la fizikan objekton.

La plej multaj el la tekstoj ĝis nun reakiritaj apartenas al la epikurisma skolo, kun verkoj de la filozofo Filodemo de Gadara. Tiuj skribaĵoj donas nun neviditan rigardon pri la etiko, la muziko kaj la serĉado de feliĉo en la antikva mondo. Tamen, la vera espero troviĝas en tio, kio

ankoraŭ restas kaŝita. Oni kredas, ke la Vilao de la Papiroj povus enhavi sektion de latinaj tekstoj kun perditaj verkoj de aŭtoroj kiel Livio aŭ Ennio. La Volvlibroj de Herkulano reprezentas, tial, la finan limon de la klasika filologio: tempa kapsulo kiu, danke al la moderna scienco, komencas paroli al ni post du jarmiloj da silento

Pro tio, la deĉifrado de la Volvlibroj de Herkulano estas unu el la plej grandaj atingoj de la moderna arĥeologio, ĉar ĝi ĉesis esti problemo de “manoj” (restaŭristoj) kaj fariĝis problemo de fiziko kaj komputado.

Krome, la uzado de artefarita inteligenteco permesis al miloj da programistoj tra la tuta mondo konkuri por deĉifri fragmentojn. En la jaro 2024, oni sukcesis legi pli ol 2000 signojn de unusola rulaĵo, tio estis tute neimagebla antaŭ unu jardeko.

Fine, kiel kurioza fakto, endas diri, ke la volvlibroj lastatempe deĉifritaj temas pri feliĉo, manĝaĵo kaj muziko, apartenantaj al la epikurisma skolo. Estas kvazaŭ reakiri blogon de antaŭ 2000 jaroj pri kiel ĝui la vivon, ĉu ne?





Flamenko

Kio estas la sorĉo?

En la flamenka mondo, paroli pri *sorĉo* egalas al la klopodo difini ion nedifineblan. Ne temas pri tekniko lernebla ĉe muziklernejo, nek noto skribebla sur partituro; *sorĉo* estas la esenco, la nuda vero de la artisto. Se iu volas serĉi ĝin, kiel diris Federico García Lorca en fama prelego en la jaro 1933, *por trovi la flamenkan sorĉon ekzistas nek mapo nek disciplino*.

Federico García Lorca ankaŭ diris, ke tiu *sorĉo* estas mistera potenco, kiun ĉiuj sentas kaj kiun neniu filozofo povis klarigi; ĝi estas tiu magia momento, kiam la artisto ĉesas esti persono plenumanta teknikon kaj fariĝas kanalo de io multe pli antikva kaj profunda. Do, ĝi aperas kiam flamenko ĉesas esti muziko kaj fariĝas rito, kiu venas de antikvaj tempoj.

Dum flamenka spektaklo, kiam la *sorĉo* aperas, estas eble senti pinĉon. Temas pri ekstremo, kiu trairas la korpon de la spektanto, kiam kantisto rompas sian voĉon aŭ dancistino faras dramatan silenton. Kaj ne, *sorĉo* ne signifas perfektecon, ĉar kelkfoje ĝi aperas en fuŝnoto, en misagordo aŭ en malgracia gesto. Tio, kio vere gravas

ne estas la estetiko, sed la emocia komunikado.



*José Monje Cruz
Camarón de la Isla*

Tra la historio de la flamenka arto estas eble trovi grandajn kantistojn kaj dancistinojn kun tiu *sorĉo*. Tío Borrigo de Jerez (1910-1983) posedis voĉon raŭkan kaj ŝiritan, sed li ne bezonis kriegi. Lia *sorĉo* aperis en liaj silentoj kaj en la maniero treni la vortojn, kvazaŭ la tuta korpo dolorus al li dum la kantado.

Agujetas el Viejo (1908-1976) reprezentis la *sorĉon* plej obskuran kaj pratempan. Li kantis kvazaŭ li estus sola en la dezerto, ne zorgante pri la

ĉeestanta publiko. Lia kanto estis sovaĝa, nepolurita, naskiĝinta el pura instinto.

Kaj ni ne forgesu pri La Paquera de Jerez (1934-2004), kiu estis eksplodo de energio. Kiam ŝi ekkantis buleriojn, ŝajnis ke la aero ŝargiĝis per elektro, temis pri *sorĉo* fizika kaj fortega.

Kaj en la moderna flamenko, José Monje Cruz "Camarón de la Isla" (1950-1992). Li estas taŭga ekzemplo pri *sorĉo* en la malfacilo. Kvankam Camarón estis genio pri tekniko kaj agordado, lia legendo naskiĝis ĉar li kapablis alvoki la *sorĉon* per supernatura maniero.

Oni rakontas, ke en liaj lastaj vivojaroj, kiam lia sano jam estis ege fragila, li koncertis kiam li apenaŭ havis voĉon. El la fizika vidpunkto li ne povis kanti, tamen, estis en tiuj momentoj kiam la *sorĉo* aperis kun pli da forto; tiel ke, kvankam li eĉ ne povis spiri, kiam li eligis ĝemon en siaj bulerioj aŭ en la *soleá*, li sukcesis igi la publikon estiĝi en kolektivan trancon, ĉar ne estis la voĉo kio frapis, sed la vero de viro, kiu lasis sian propran vivon en ĉiu noto.

Tiel, kiam flamenka kantisto rompiĝas kaj lia voĉo krevetas kaj ŝajnas, ke li restos sen aero, tiu nodo en la gorĝo, kiun oni sentas aŭdante lin, tio estas la *sorĉo*.

*Sur miajn ŝultrojn la sorĉo supreniras,
mian hararon ĝi ŝiras kaj igas min kanti,
kaj se la ĝemo el interne ne eliras,
mi preferas, antaŭ ol mensogi, silenti.*

Juan Peña "El Lebrijano".





Fervojista Angulo

La fervojo de S-ro Henderson

fervojista@esperanto.ac

<https://hafe-19.websself.net>

Post la malfermo de la Suez Kanalo en la jaro 1869, la brita kolonio Ĝibraltaro en Andaluzio fariĝis pli kaj pli grava. Tamen, el la ekonomia kaj komerca vidpunktoj mankis fervoja linio por transporti varojn kaj homojn de la kolonio en la nordajn regionojn de Hispanio kaj de tie al Eŭropo. Hispanaj leĝoj malpermesis al britoj konstrui fervojlinion rekte el Ĝibraltaro, do, oni trovis solvon: la nova linio, anstataŭ rekte el la kolonio, komenciĝus en Alheciro, haveno tre proksima al ĝi.

La fervojo ne nur estus utila al komerco, ĝi ankaŭ ebligis al la oficiroj kaj loĝantoj de Ĝibraltaro la okazon

fuĝi de la somera varmo norden, al pli freŝaj regionoj de Andaluzio aŭ eĉ al la nordo de Hispanio. Por allogi vojaĝantojn, oni konstruis apud la stacidomo de Alheciro la luksan hotelon "Reina Cristina", kiu baldaŭ fariĝis renkontejo por la politika, milita kaj arta elitoj. Inter ĝiaj gastoj troviĝis la reĝo de Hispanio Alfonso la 13-a, Orson Welles kaj eĉ Winston Churchill.

Sir Alexander Henderson, brita financisto, ekonomie subtenis la projekton, kaj la inĝeniero John Morrison, konata kiel *Juanito*,

Vagonaro sur la fervojo
de S-ro Henderson



respondecis pri la konstruado de la fervojo. La tasko ne estis facila, ĉar Andaluzio en la 19-a jarcento estis konsiderata danĝera zono, plena de banditoj, kiuj kaŝis sin en la montoj. Vojaĝi surtere estis riskoplene tiuepoke, ĉar la mulo-karavanoj kaj poŝtkaleŝoj ofte estis viktimoj de rabajoj, kvankam la situacio pliboniĝis pro la kreado de la Civil-Gvardio, kies patroloj gardis la sekurecon sur la vojoj kaj dum la konstruado de la fervojo. La projekto finiĝis en la jaro 1892 kaj tre baldaŭ ĝi iĝis konata kiel la *"fervojo de Mister Henderson"*. La nova linio rapide populariĝis.




Sir Alexander Henderson
1850 ~ 1934

Kiel dirite, la fervojlinio komenciĝis en Alheciro, ĝi finiĝis en la malaga vilaĝo Bobadilla. Tie estis eble sekvi ĝis Madrido aŭ al aliaj urboj de Andaluzio. Entute estis 170 kilometroj kaj 22 stacidomoj, trapasitaj ĉiutage de ses pasaĝeraj trajnoj.


Por ebligi la aliron de Ĝibraltaro al Alheciro, oni kreis ankaŭ marlinion per la vaporŝipo *Elvira*, tiel nomita honore al parenco de S-ro Henderson. En la jaro 1913, la administrado de la linio pasis al la *Compañía de Ferrocarriles Andaluces* (Kompanio de Andaluziaj Fervojoj) kaj en 1941 definitive al RENFE, la tuthispana fervoja kompanio.

Nuntempe, ankoraŭ la fervoja linio ekzistas, ĉefe kiel efika turismaĵo. La trajna vojaĝo daŭre komenciĝas en Alheciro, la plej suda fervoja stacidomo en la kontinenta Eŭropo. De tie, lokomotivo kaj du plusaj vagonoj forveturas trifoje tage. La unuaj kilometroj de la vojaĝo estas mirinda spektaklo: la golfeto de Alheciro, arbaro kun kverkoj kaj la rivero Gvadiaro estas videblaj el la vagonaro. Poste, la trajno malrapide supreniras, iom post iom, tra la Arunda Montaro. La tuta vojaĝo daŭras 3 horojn, pasante tra 16 tuneloj kaj sur 20 pontoj, ĝis atingi 800 metrojn super la marnivelo.

La vojaĝo vere havas la ĉarmon de la antikvaj trajn-vojaĝoj: la nostalgia ritmo de la marŝado, la apudeco de la naturo kaj la andaluziaj pejzaĝoj, neŝanĝitaj tra jarcentoj.



TRANS SUNO!



La lanĉejo zumis! Homoj, tre malgrandaj kompare al ŝipo, kuregis kiel formikoj..okupataj pri lastminutaj taskoj! Tiam, laŭparolilo ekkriis:...

Ene de malgranda konstruaĵo, kiu utilis kiel ĉefsidejo, Kolonelo Graves alparolis malgrandan grupon de seriozmenaj oficiroj.

Tempo, minus 30!
Skipo, enŝipiĝu!

Ek! Eniru!



Sinjoroj! Post 30 minutoj, vi ekflugos!
Kiel vi ĉiuj scias, ĉi tiu estos la dua provo,
kiun la Aer-armeo faras por atingi
Marson! Vi bone konscias pri la riskoj!



La unua kosmoŝipo sendita malaperis ĝuste kiam ili postlasis Lunon. Tiam ni perdis la radio-kontaktan kun ili.. Ni sukcesis aŭdi ion pri "terura atako".



Vi ĉiuj estas volontuloj. Se iu inter vi deziras retiriĝi, jen la plej taŭga momento.



Ĉu neniu? Permesu al mi deziri al vi la plej bonan ŝancon... kaj Dio helpu vin !



La oficiroj stariĝis. Ili eliris tra malgranda pordo, ĉiuj silentis. Tiam, laŭparolilo kriis ...



Tempo, minus 20!
Ŝipanaro, enŝipiĝu tuj!

Ek, kapitano


Milionoj da steloj lumigis la noktan ĉielon. La arĝenta nazo de la kosmoŝipo alcelis ilin. La grupo marŝis en la enir-pordon de la ŝipo.



Venonta haltejo:
Marso !

Estu tiel!

Kiam la lasta oficiro eniris, la pordo fermiĝis.



Rigardu!

Kio estas tio?

Atentu!
Alia kosmoŝipo.

Alia kosmoŝipo ĵus aperis en la ĉielo preter la montaro. Blua-blanka flamo elfluis en la tuboj ĉe ĝia vosto.

Ĝi estas la unua ŝipo, tiu kiu malaperis antaŭ unu jaro!!!

Evakuu la areon !!!




La ĵus aperinta kosmoŝipo eksurteriĝis. Ĝia nazo rigardis la alian ŝipon.

Gi alvenas!

Fajrobrigadaj kamionoj, atentu!



Dum momento, ĝi tremis kiam la motoroj silentiĝis. Fine, ĝi perfekte eksurteriĝis.



Mallongaj raketaj ekbruloj bremsis ĝian falon, ĝis ĝi fine restis milde sur la tero.

Fajrobrigadaj kamionoj, ĉio en ordo!



Dume, la maltrankvilaj surteraj teamoj kuris en la ĵus alvenintan ŝipon. Laŭparolilo blekis:

Tempo minus 10

Ne! Atendu!



La pordo de la kosmoŝipo malfermiĝis, tiam aperis viro, li kriis al apuduloj...

Haltigu ilin! Vi ne devas ekflugi aŭ ni ĉiuj mortos.

Ho, Dikson! Reale ĉu estas vi?



Kolonelo Graves tuj alvenis.

Jes, estas mi, kolonelo. Ni revenis por averti vin.

Nu, kie diable vi estis dum la pasinta jaro?



Dikson kaj la ceteraj ŝipanoj decendis de la ŝipo per ŝtuparo.

Ha, uloj? Ĉu laca soldato rajtas trinki tason da kafo?

Kompreneble, serĝento. Tie en la kantino vi trovos ĉion.

Kolonelo, mi volas paroli al vi private. Mi rakontos al vi nian historion.



La ŝiparanoj iris en la manĝejon, sed kolonelo Graves kondukis al Dikson en la komandejon.

Glaso da ĉi tio varmigis vin, kapitano

Dankon, kolonelo! Ĝi estos tre utila al mi. Mi supozas, ke vi deziras scii kio okazis...



Kiel vi scias, ni ekigis nian vojaĝon en Marson la pasintan jaron, temis pri la unua interplaneda vojaĝo. 55 milionojn da kilometroj for !

Rapideco: ...5000

Alteco: 65...



Post unu semajno, ni jam estis proksime al Luno.

Hej, amikoj. Antaŭ jardeko ni sukcese atingis Lunon kaj ni nun vojaĝas en Marson !

Neniu povas batali kontraŭ la progreso.



Tamen, tiu batalo ekzistis. Post kelkaj tagoj iu atakis nin

Rigardu, surekrane!!!

Kapitano! Jen stranga kosmoŝipo!

Kio estas tio, serĝento?



Ĝi venis kontraŭ nin ege rapide!

Mi pensis, ke tiaj aparatoj ne ekzistis!


Ŝajnas, ke ili ja ekzistas! Ĉiuj postenaj kaj estu pretaj!



Mi komencis informi pri la atako per radio al Tero, tamen la alia ŝipo lanĉis blindigantan fulmon.

Atentu, Tero!
Atentu, Tero!

Ili pafas kontraŭ nin!
Atentu!!!



Sensukcese mi pruvis informi pri la okazanta atako.



Kiam ni rekonsciiĝis, sur la aero ŝvebis morta silento. La motoroj estis kvietaj, tamen ni moviĝis tra la kosmo.

Mia Dio!

Ŝajnas, ke tiu ŝipo trenas nin, per ia magneta altiro, reen al Tero!



La ceteraj ŝipanoj rekonsciiĝis. Ni rigardis, ke la Tero alproksimiĝis pli kaj plie. Ni komprenis nenion.

La Tero aspektas strange. Ter-formacioj estas malsamaj

Kion vi pensas pri tio, Bob?

Momenton, kapitano! Mi kontrolas miajn mapojn.



Bob estas nia navigisto. Ekzistas nenio en la kosmo ne konata de tiu knabo. Baldaŭ li turnis sin al mi kun grandaj okuloj.

Kapitano! Okazas io tre stranga. Laŭ miaj kalkuloj ĉi tio ne povas esti la planedo Tero. La aliaj planedoj ŝanĝis siajn poziciojn. Marso ne plu estas tie, kie ni estis atakitaj. Krome, vidu, ĉi tiu planedo havas du lunojn !!!



Estis nekredeble! Mi petis al Bob rekalkuli nian pozicion, por certigi, ke ni troviĝis en la suna sistemo.

Jes, kapitano.

Evidente! se videblas du lunoj.

Ni troviĝas ĉe la suna sistemo, ĝuste je la sama distanco ekzistanta inter Suno kaj Tero, do ĉi tio devus esti la Tero. Tamen, evidente ĉi tiu planedo ne estas Tero.



La stranga kosmoŝipo trenis nin ĝis belan urbon.

Rigardu tion!

Ĉu ni vojaĝis tra la tempo?

Kie ni estas?



Ĉu eble ni estis transportitaj tra la tempo?


Du lunoj! Ĉi tio ne povas esti nia planedo!

Eble jes! Verŝajne en la estonteco nova luno ĉirkaŭiros nian planedon. Kial ne?



Atentu! Ni surteriĝas. Estu pretaj!

Kion ni trovos ĉi tie?



Fine, ni surteriĝis en grandega kosmo-haveno. Du pliaj ŝipoj troviĝis ĉirkaŭ ni. Tuj, malgrandaj viroj eliris el tiuj kosmoŝipoj. Ili babilis en stranga lingvo. Unu el ili alparolis min:

Akompanu min, kapitano Dixon

Cu vi konas mian nomon?

Li estis 90 centimetrojn alta, tiu saĝulo! Mi sekvis lin ĝis nekredeblan konstruaĵon.

Respektinda, jen ili!

Sidiĝu, kapitano Dikson!

Nu, ŝajnas, ke ĉi tie, ĉiuj konas min!

Jes, kapitano. Ni scias ĉion pri vi kaj pri via tuta planedo. Ni observas vin de antaŭ multaj jarcentoj, ĝuste de kiam ni devis detruvi vin.

Do, ĉi tio ne estas la Tero

Ne, kapitano. Vi troviĝas sur la planedo Bamuno, la ĝemela planedo de la Tero. Ambaŭ planedoj estas preskaŭ similaj. Ili sekvas saman orbiton. Sed viaj sciencistoj neniam trovis nin pro tre simpla fakto.

Vi vidas sur ĉi tiu mapo, ke Bamuno ĉiam estas rekte kontraŭ Tero. Suno troviĝas konstante inter ni kaj Bamuno.

Ni celis iri en Marson. Kial vi nin venigis ĉi tie?


Por averti vin ĉiujn. Ĉesu la kosmajn vojaĝadojn! Antaŭ multaj milionoj da jaroj ekzistis civilizacio sur via planedo, tiam Tero havis du lunojn, kiel nia planedo. Tiam, tiu civilizacio ekigis vojaĝadi tra la kosmo kaj, do, ili trovis nin. Al tio sekvis milito. Ni devis detruvi ilin. Ni devis bombardi viajn lunojn per niaj misiloj. Tio provokis la tutan detruon de unu el la lunoj, la alia restis kun miliardo da krateroj, ĝi ankoraŭ estas tia. Via planedo, tiam, fariĝis nur amaso da brulantaj vulkanoj, ĝis kiam denove alia civilizacio aperis.

Via civilizacio!

Ni observis vin. Ni lernis viajn lingvojn dank'al viaj radio-signaloj. Ni vidis kreski denove civilizacion sur via planedo, kaj ni vidis, ke vi ekvojaĝis kosmen. Nun, reiru kaj averti ilin, ke vi devas ĉesi vojaĝi tra la kosmo. Ĉesu kosmajn vojaĝojn aŭ ni, denove, devos detruvi vin. Via raso estas sovaĝa, ni deziras nenion el vi. Restu sur via propra planedo, kaj se vi konsideras tion konvena, detruu vin mem. Sed restu ekster la kosmo!

Kaj tiam, ili revenigis nin. Do komprenu, ke tiu nova kosmoŝipo ne povas esti lanĉita. Ni devas rezigni pri la ideo vojaĝadi tra la kosmo, male, ili detruus nin. Ili observas nin atente, ili troviĝas tie, ĝuste trans Suno.

Jus aperis!



EKKRIAS LA POETO **Poemoj kaj Hajkoj**

Aŭtoro: Ángel Arquillos.
Eldonejo: Andaluzia Esperanto-Unuiĝo,
Malago.
Eldon-jaro: 2026
Paĝoj: 116
ISBN 9788493030490
Poemaro kaj hajkoj.
Prezo: 6 €.

Nova kolekto de poemoj de la malagano Ángel Arquillos, al kiuj aldoniĝas ĉi-foje serio da hajkoj. Kiel asertas la aŭtoro mem, li verkas pri malĝojo disde sia fantazio, aldonante pozitivajn vortojn, preskaŭ neniam pri li. Tamen, ĉio eliras el lia koro, ĉar tiuj poemoj estas peco de la verkisto kaj de sia fantazio.

SONORILO DE ISLANDO

Aŭtoro: Halldór Laxness
Tradukita de Baldur Ragnarsson
Eldonejo: Mondial, Novjorko.
Eldon-jaro: 2025
Paĝoj: 400
ISBN: 9781595695086
Prezo: 31 €.


Historia romano pri malfacila epoko dum la dana koloniigo de Islando, kiam tiu insulo estis subpremita de severa regado de la Danoj, de epidemioj, malsato kaj komerca monopolo. La tradukisto estis Baldur Ragnarsson, islanda instruisto kaj poeto. En 2007, Esperantlingva Verkista Asocio elektis lin kiel kandidataton al Nobel-premio pri literaturo.



nun ni

junulara paĝo

Andaluzia Junulara Esperanto-Unuiĝo - AJEU



CURSO GRATUITO DE ESPERANTO

Información sobre el curso de esperanto organizado por
Andaluzia Junulara Esperanto-Unuiĝo:

- **Curso:** para principiantes (niveles A), conformados por dos grupos.
- **Modalidad:**
 - **Grupo 1:** a distancia asíncrono.
 - **Grupo 2:** a distancia con reuniones grupales semanales de una hora de duración (horario vespertino). El calendario detallado será enviado a todos los inscritos a este grupo durante la segunda semana de septiembre.
- **Quórum (por grupo):** 3 alumnos.
- **Alumnos máximos (por grupo):** 10 alumnos.
- **Calendario:** el curso se desarrollará durante los meses de octubre, noviembre y diciembre del año 2026.
- **Lengua vehicular:** esperanto. El español será usado solo en las primeras lecciones.
- **Instructor:** Alejandro Burgos Escalante.
- **Requisitos:** tener entre 16 y 35 años, disponer de tiempo para asistir a las reuniones semanales (solo en el caso de elegir el grupo 2) y tener la residencia en Andalucía, Ceuta o Melilla.
- **Materiales:** serán provistos por el instructor de manera gratuita.
- **Inscripción:** ajeu@esperanto.ac
- **Plazo de inscripción:** hasta el 31 de agosto de 2026.

ŜAKO


Peon-strukturoj



Sciante, ke ĉiu ludanto komencas ŝakludon kun 8 peonoj. Ni lernu hodiaŭ kio estas la peon-strukturoj kaj ties graveco dum la disvolvigo de ludo.

La peon-strukturoj rilatas al la loko kie situas la peonoj sur la tabulo dum ludo, kelkaj strukturoj estas bonaj kaj aliaj ege malbonaj. Tiel, solida peon-strukturo povas doni al ludanto la povon ataki kaj konfidon dum defendado. Krome, ili helpas kontroli la centron de la tabulo kaj limigi la movon de la kontraŭaj pecoj.

Ĝenerale, bona strukturo disponas konektitajn peonojn, kiuj povas defendi unu la aliajn. Ni vidu kelkajn ekzemplojn:



Kiam la peonoj estas konektitaj, tio estas, kune unu apud la alia sen malplenaj vertikalaj inter ili, ili povas labori teame kaj limigi la movojn de la kontraŭulo.

En la tiel nomata, peon-ŝtormo, peonoj estas lanĉitaj por esti interŝanĝitaj de la kontraŭaj peonoj kies celo estas defendi reĝon. Ili amase detruas tiun defendon.

Cele al tio la atakantaj peonoj devas esti tre bone konektitaj unu kun la aliaj. Tio estas, oni ofertas proprajn peonojn por malfermi la kontraŭajn vertikalajn liniojn.

Sed, atentu! Ĉi tiu oferado de propraj peonoj ne povas signifi mem-detruon de la defend-linio de nia reĝo.







Ĉe peon-ĉeno, peonoj troviĝas sur la sama diagonalo seninterrompe. Tiumaniere, la peonoj protektas unu la aliajn, escepte de la bazo, kiu devas esti protektata de alia peco. La ĝenerala regulo indikas, ke la ludanto devas ataki laŭ la direkto, kien la peon-ĉeno celas.



Pro tio ke la ĉeno estas diagonala, ĝi povas helpi al la ludanto kontroli la kvadratojn de la koloro, sur kiu troviĝas la ĉeno. Tamen, ĉar ĉiuj peonoj estas sur la sama koloro, ili lasas truojn inter si, kiuj ne estas protektitaj.

Temas ankaŭ pri tre efika maniero kontroli la centran parton de la tabulo. Kontraŭe, ankaŭ ekzistas malbonaj peon-strukturoj, kiuj estas evitendaj. Jen kelkaj el ili:



Duobligitaj peonoj. Du sam-koloraj peonoj troviĝas sur la sama vertikala linio. Ĝenerale tiu estas tre malforta pozicio, pro la fakto, ke ili ne povas protekti unu la alian; krome ili ankaŭ ne povas moviĝi facile, ĉar unu el ili estas blokita.

Malbona strukturo ankaŭ estas tiu kiu izoligas peonon. Ĝi ne estas protektata de alia peono, do estos necesa alia peco por defendi ĝin, tiel oni perdas kapablon por ataki, se estas necese protekti ĝin pere de alia pli grava peco.



Fine, alia malbona peon-strukturo estas tiu konata kiel "peon-insulo". Temas pri grupo de peonoj, konektitaj inter ili, sed apartigitaj de aliaj peonoj per malferma vertikala linio, aŭ linioj. Peon-insulo estas facile atakebla, nur estas necese minaci la peonon kiu estas bazo de tiu grupo aŭ insulo.

Skolta Mondo



LA SIMBOLO DE LA SKOLTOJ

Ĉu vi iam vidis knabojn, uzantajn pantalonetojn eĉ vintre, kiuj kantante marŝas?

Eble jes, kaj verŝajne kun rideto, vi pensis: —"kiuj estas ĉi tiu? Ĉu ili estas frenezaj?" Ne, ili estas skoltoj.

La uniformo povas ŝanĝi de unu lando en alia, ekzemple oni povas uzi kolorojn bluan, verdan, brunan... sed ĉiuj, absolute ĉiuj, uzas la saman simbolaron.

Robert Stephenson Smyth Baden Powell, generalo de la brita armeo, en la jaro 1907 fondis la skoltan movadon (por viroj), kaj la skoltinan movadon (por virinoj). Lia edzino -Lady Olav-, superrigardis la virinan movadon. Hodiaŭ en multaj landoj, ambaŭ movadoj unuiĝis, tamen ili ankoraŭ havas malsimilajn simbolojn, tiujn adoptitajn de la fondinto. La simbolo de la skoltoj estas LILIO kaj tiu de la skoltinoj, alidirte *gvidistinoj*, estas TRIFOLIO.



Skoltoj



Skoltinoj (gvidistinoj)

Lordo Baden Powell uzis lilion kiel simbolon, ĉar ĝi estas uzata en kompasoj kaj ĝi *ĉiam direktiĝas al la ĝusta vojo (kaj supren)*. Ankaŭ sur la trifolio, la nadlo en la centra parto de la desegnaĵo direktiĝas supren, ĝi similas al kompasoj.

La tri pintoj de la lilio kaj la tri petaloj de la trifolio rememoras la tri punktojn de la skolta promeso. La du steloj aperantaj sur ambaŭ simboloj simbolas veron kaj konon. Entute dek pintoj en du steloj, kiuj memorigas la dek punktojn de la skolta leĝo. Fakte, skoltoj devas senti sin fratoj sub komuna leĝo, eĉ sekvantoj de malsamaj religioj.

La skolta promeso, do la pintoj de la lilio kaj la petaloj de la trifolio, proklamas:

Je mia honoro, mi promesas, ke laŭ mia povo:

1) mi plenumos miajn devojn al Dio kaj al mia patrujo;

2) mi ĉiam helpos aliulojn;

3) kaj mi obeos la skoltan leĝon.

La skolta leĝo, do la dek pintoj de la du steloj, proklamas jenon, kvankam laŭlande la eldiraĵo povas varii, pro religio aŭ lingvo:

Skolto kaj Skoltino

1) estas fidindaj;

2) estas lojalaj;

3) devas esti utilaj kaj helpemaj;

4) estas amikoj al ĉiuj kaj fratoj al ĉiuj aliaj Skoltoj.

5) estas ĝentilaj.

6) estas amikoj de bestoj.

7) obeas ordonojn.

8) ridetas kaj fajfas malgraŭ malfacilaĵoj.

9) estas ŝparemaj.

10) pure pensas, parolas kaj agas.

Kaj fine, oni diras "Iam skolto, ĉiam skolto".



Andaluza Kuirarto

Mozarabaj terpomoj

Temas pri tradicia andaluza recepto kun sevila origino, kiu memorigas al ni la famajn “ferocajn terpomojn”. La unuaj informoj pri ĉi tiu plado igas nin vojaĝi en la mezepokon, kiam la andaluza gastronomio ricevis influojn de la islama civilizacio, kun nord-afrikaj ingrediencoj al kiuj aldoniĝis la ter-pomoj, tiam ĵus veninta el Ameriko.


Ni preparo pladon por 6 homoj.

Jen la ingrediencoj:

- Majonezo, 100 ml.
- Mielo, unu kulereto.
- Mustardo, unu kulereto.
- Citron-suko, unu kulereto.
- Dolĉa papriko, unu kulereto.
- Cepo pulvorigita, ½ kulereto.
- Ajlo pulvorigita, ½ kulereto.
- Kumino, ½ kulereto.
- Salo, iomete.
- Terpomoj, 3.
- Petroselo, nur kiel supra ornamaĵo.



Majoneca saŭco



Cepo



Ajlo



Dolĉa papriko



Mustardo



Citron-suko




Petroselo



Kumino



Salo



Terpomoj

Jen la elaborado:


1) Metu ene de bovlo la majonezan saŭcon, mustardon, mielon kaj citronan sukon. Batu ilin per frapilo ĝis la atingo de homogena teksturo.



2) Poste aldonu la ceterajn ingrediencojn, do, origanon, paprikon, cepon kaj ajlon pulvorigitajn, kuminon kaj salon. Batu ĉion denove. Enmetu la rezultitan saŭcon ene de frigujo.



3) Dume, boligu la terpomojn dum 20 minutoj. Senŝeligu ilin kaj distranĉu laŭ malgrandaj pecoj, sufiĉe grandaj por esti enbuŝigitaj en unu mordo.



4) Miksu terpomojn kaj saŭcon, sed atentu, ne disrompu la terpomojn. Fine, aldonu iomete da freŝa petroselo, kiel dekoracio, sur la terpomoj kun saŭco.



La mozaraba saŭco estas sufiĉe forta kaj densa, do rekomendinde miksi la terpomojn kun ne tro granda kvanto da saŭco. Uzu ĝin kiel apetitiĝaĵon aŭ por akompani fiŝaĵon, bovaĵon aŭ kokaĵon.

BONAN APETITON!



Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

La operaco "Tracer"

Germanio helpis la ribelantan armeon okaze de la hispana civila milito. Tiel, kiam eksplodis en Eŭropo la dua mondmilito en la jaro 1939, la germana nazia reĝimo atendis la kunlaboradon kaj eĉ la militan apogon de Hispanio favore al Germanio. Tamen, Hispanio restis neŭtrala dum la konflikto, sed estas necese memori, ke ne la sudo de Hispanio, do en Andaluzio, troviĝas la brita kolonio Ĝibraltaro.

Malgraŭ tiu neŭtrala statuso, Britio timis la eniron de germanaj trupoj tra Hispanio kun la celo konkeri la britan kolonion. Se tiel, la Mediteranea Maro restus fermita por la aliancanoj. Do, Britio ekplanis la operacion *Tracer*, se tio okazus.

La plano estis tre simpla. Ĝibraltaro estas granda rokego, do, oni decidis elkavigi ene de la roko sekretan kirasĉambron, simile al bunkro. Tie restus grupeto da britaj soldatoj, sep laŭ la unuaj pripensoj, se fine germanoj konkeris la kolonion. Tiuj soldatoj povus informi al Londono pere de radio-stacio pri la movoj de germanaj ŝipoj kaj trupoj en la enirejo de la Ĝibraltara Markolo.

Izoleco de tiuj soldatoj estus kompleta. Ili disponus pri sufiĉaj provizoj por supervivi ĝis sep jaroj, tamen ili devus ŝpari akvon kaj energion. La bunkro havus du malgrandajn fendojn, utilajn kiel observejoj.

Brita kolonio Ĝibraltaro sude de Andaluzio



Same, por eviti bruojn, la planko de la bunkro estus kovritaj per korko, tamen silento devus estis preskaŭ kompleta. Tiuj sep soldatoj, entute unu oficiro, du kuracistoj kaj kvar radio-telegrafistoj, devis elteni obskurecon kaj klostrofobion. Eĉ oni pripensis pri sistemo por embalamigi kaj sepulti eblajn mortintojn dum la enirigo, kaj eviti tiel malbonajn odorojn kaj malsanojn. Unu el la ĉefaj respondeculoj de ĉi tiu planado estis la tiama komandanto Ian Fleming, poste aŭtoro de la filmo-serio de la spiono James Bond.

Tiam, la grupeto da soldatoj estis resenditaj en Brition kaj la bunkro definitive sigelita. La operaco "Tracer" restis forgesita.

Tamen, dum la sekvantaj jardekoj tra la brita kolonio kuris la onidiron pri la ekzisto de tiu bunkro. Sed la projekto estis tiel sekreta, ke tuj post fini ties konstruado, la respondeculoj estis senditaj en Brition, tiel neniu povus koni la certan situon.


En la jaro 1997 oni eltrovis la enirejon. Ene de la bunkro ankoraŭ troviĝis radio-fadenoj kaj korkaj



Trovita bunkro ene de la Roko de Gibraltaro, konstruita dum la operaco "Tracer"

En majo 1943 aliancanoj elŝipiĝis en la nordo de Afriko, tie la germanaj trupoj estis venkitaj. Do, danĝero pri ebla invado de Ĝibraltaro malaperis.

lamenoj sur la planko. En la jaro 2008, la lasta supervivanto de tiu grupo, la kuracisto Bruce Cooper, vizitis la bunkron kun sia familio.



	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G
1								
2					■			
3							■	
4					■			■
5		■		■				
6								
7								■
8						■		

HORIZONTALALE

- Ilo, uzata por streki rektajn liniojn paralelajn sur ebena surfaco aŭ rando.
- Spirebla gaso, kiu ĉirkaŭas Teron. ■ Montra pronomo signifanta «tiu afero, aĵo, ideo...».
- Koloro. ■ Litero trovebla ĉe la aŭtomobiloj de la Gabona Respubliko.
- Altirforto de tio, kio prezenti tian intereson aŭ plaĉon, ke oni ĝin deziras. ■ *(Inverse)* Membro de grupo.
- Finaĵo de la substantivoj. ■ Finaĵo de la adjektivoj. ■ *(Inverse kaj sen la lasta vokalo)* Ago, per kiu gaso eliĝas nevideble.
- (Akuzative)* Monato de la jaro.
- Enprofundiĝi.
- (Inverse)* Manĝebla semo de duongrimpa herbo tre kultivata en tropika Azio. ■ Subjunkcio, enkondukanta kompletigajn proponojn.

VERTIKALE

- A. Farmacia plata pastelo.
- B. Longa ŝtala stango kun adekvata profilo, kiu portas kaj gvidas veturilojn. ■ (*Sen la lasta vokalo*) Ĉefa urbo de antikva regiono en Peloponezo.
- C. (*Akuzative*) Fortega vento.
- Ĉ. Aŭdebla aervibrado. ■ Numeralo.
- D. Simbolo de kilo. ■ Denove, simbolo de kilo. ■ (*Inverse kaj akuzative*) Apartenanta al mi.
- E. (*Inverse kaj adverbe*) Frukto de bero pomgranda, kun ledeca ŝelo, enhavanta multajn manĝeblajn, purpuretajn semojn.
- F. Vi kaj mi. ■ (*Inverse*) Demanda aŭ ekkria adjektivo, demandanta pri la nombro aŭ la vico.
- G. (*Inverse*) Japana tabloludo. ■ Prepozicio montranta la lokon, interne de kiu estas io aŭ iu. ■ Finaĵo de la adverboj.

Rebuso



Kie troviĝas Estonio?



*Apud vi, mi ĉiam estas,
sed kiam suno dormas
mi tuj forestas.
Kiu mi estas?*

SOLVOJ AL LA VORTO-LUDOJ DE LA PASINTA NUMERO

B	A	J	O	N	E	T	O
I	M	A	G	I	N	O	J
L	E	R	O		O		
E	R	O	T	I	S	M	O
T	I	N		O	R	O	N
U	K		A	V	E	N	O
J	O	V	I	A	P	O	K
O	N	A	N	O		N	I

REBUSO:

Oni proponis jenan demandon:

Kion vi faros la venontan someron?

Aperis jenaj bildoj:

RIPO + silabo ZI + ene de MARO la silabo KO

Tio estas: Ripo zi en Maro ko.

El kio rezultas: **RIPOZI EN MAROKO**

BONAN VOJAĜON:

Kadizo → Okazis → Vaskio → Salivo → Sevilo

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio. Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

La Asociación Andaluza de Esperanto es la organización que tiene como objetivo difundir la lengua internacional esperanto en Andalucía. Se fundó en el año 1984 gracias a la iniciativa de esperantistas de las provincias de Málaga, Sevilla y Córdoba. Hoy pertenecen y colaboran con AEU esperantistas de toda Andalucía y también de fuera de ella.

Estraro

Prezidanto / Presidente:
Vicepresidente / Vicprezidanto:
Sekretario / Secretario:
Kasisto / Cajero:
Voĉdonantoj / Vocales:

Directiva

Ángel Arquillos López
Alejandro Burgos Escalante
José M^a Rodríguez Hernández
Carlos Spinola
Juan Díaz Casado
Alejandro Pinos Cabello
Yousef Hamdi el Farouki

Poŝta adreso / Dirección Postal: C/ Ánfora 6 5º D 29013 Málaga (Hispanio)
TTT-paĝo / Página web: www.esperanto.ac
Tvitero / Twitter: [@AndaluzioEO](https://twitter.com/AndaluzioEO)

[Aliaj adresoj de la E-movado / Otras direcciones del movimiento esperantista:](#)

Federación Española de Esperanto: www.esperanto.es
Asociación Universal de Esperanto: www.uea.org



MALAGO, 9-13a de oktobro 2026

VERDA LINGVO POR VERDA NATURO

Esperanto por daŭripova mondo

4a
NaturAmika
KuturSemajno
en Esperanto



22a Andaluzia
Kongreso de
Esperanto

*Kiam la naturo parolas,
ni elektas komunan lingvon.*

Inter la rokoj kaj akvo de El Caminito del Rey,
ni memoras ke la Tero ne bezonas multajn lingvojn –
nur unu kiu respektas, kunigas kaj protektas.

Aliĝu!

<https://kulturservo.esperanto.net/evento/>

nakseake-2026



Esperanto – vojo inter homoj kaj naturo

